Kondiĉoj por rajti kandidatiĝi

- Havi liberan senvizan aliron al Ŝengen-landoj kaj laborpermeson en *subvenciebla* lando (la kandidato devas nepre loĝi en unu el tiuj landoj dum la laborado). Se vi loĝas en alia lando sed senvize rajtas translokiĝi al iu el tiuj landoj, vi mem devas zorgi pri restado. *Subvencieblaj* landoj estas tiuj de EU, ELKA (krom Svisujo), Makedonujo kaj Turkujo.
- Havi scipovon de Esperanto almenaŭ je B1-nivelo;
- Havi scipovon de la Angla almenaŭ je C1-nivelo;
- Havi kvalitan retaliron kaj sufiĉajn komputilajn rimedojn por voĉkunsidi per Skajpo kaj aliaj tiaj programoj;
- Havi bonan parolan kaj skriban esprimkapablon;
- Havi iniciateman, maturan, reprezentan kaj diplomatian personecon;
- Esti entuziasma pri Esperanto;
- Esti kapabla Esperanton prezenti taŭge en diversaj eksteraj medioj kaj por diversaj celpublikoj;
- Esti kapabla kunlabori en teamo, peti helpon kiam necese, kaj akcepti konsilojn kaj konstruan kritikon de la kunlaborantoj;
- Esti kapabla labori sen proksima superrigardo kaj vartado, tamen raportante regule kaj starigante demandojn kiam tio necesas por efike labori;
- Esti kapabla taŭge sociumi;
- Sinteni pozitive pri kunlaboro kun la respondecaj estraranoj pri Eksteraj Rilatoj de UEA kaj TEJO, la diversaj komisiitoj pri eksteraj rilatoj, la TEJO-volontuloj, la aliaj oficistoj kaj la aliaj anoj de la komisionoj de TEJO kaj UEA pri Eksteraj Rilatoj;
- Konscii pri siaj respondecoj enkadre de la demokratiaj strukturoj de UEA kaj TEJO, akceptante la devon sekvi la politikon kaj plenumi la decidojn de la organoj de ambaŭ asocioj.

Estos tre pozitive konsiderataj:

- Aktiveco pri eksteraj rilatoj de TEJO aŭ/kaj UEA;
- Aktiveco en alia NRO je internacia nivelo aŭ en politika partio;
- Kapablo paroli publike;
- Kompetento pri agadoj kaj starpunktoj rilataj al la Celoj por Daŭripova Evoluo, Homaj Rajtoj kaj Indiĝenaj Lingvoj;
- Kompetento pri lingvopolitiko;
- Kono de la ĉefaj starpunktoj kaj agadoj de TEJO kaj UEA kadre de siaj respektivaj historioj de eksteraj rilatoj;
- Kutimo vojaĝi flekseble kaj malmultekoste;
- Loĝloko en aŭ proksime de Bruselo, Parizo, Strasburgo aŭ Novjorko, aŭ preteco translokiĝi al unu el tiuj urboj;
- Labora sperto en internacia NRO aŭ en eŭropa aŭ internacia institucio;
- Scipovo de la franca lingvo;
- Sperto pri Erasmus+ kaj la Eŭropa Junulara Fondaĵo;
- Kono kaj sperto pri la Esperanto-movado;
- Sperto pri la organizoj en kiuj TEJO kaj UEA aktivas (UN, UNESKO, CoNGO, FoJE, IKRJO, UNITED, UNOY);
- Sperto pri gvidado de volontulaj teamoj.

Al taskoj apartenos, interkonsente kun la elektoto:

- Prizorgi la burokrataĵojn rilataj al eksteraj rilatoj, interalie:
    - akiro de jaraj kaj portempaj permesiloj ĉe UN kaj Unesko;
    - plenigo kaj forsendo de elektronikaj formularoj kaze de konsultadoj;
    - supervido de limdatoj por kandidatiĝi por aranĝoj/postenoj kaj por konsultadoj;
- Helpi niajn homojn kaj niajn organizaĵojn (ĉefe UEAn kaj TEJOn, sed laŭeble ankaŭ fakajn kaj landajn asociojn) prepari siajn kandidatiĝojn al eventoj kaj postenoj kaj eventuale gvidi kampanjadon por ili;
- Helpi prepari partoprenon en eventoj;

- Mentori malpli spertajn reprezentantojn;
- Analizi dokumentojn antaŭ la eventoj por trovi la politikajn punktojn plej signifajn por nia komunumo;
- Helpi okaze de pretigo de publikaj alparoloj flanke de reprezentantoj de TEJO kaj de UEA;
- Kunordigi raportadsistemon;
- Ordigi kaj plusekvi la kontaktojn post la eventoj;
- Subteni la agadon kadre de organizoj kaj projektoj en kiuj TEJO aŭ UEA estas aktiva partnero;
- Sekvi korespondadon en la interorganizaj retlistoj, partopreni interorganizajn kunsidojn kaj taŭge (re)agi kadre de diversaj formoj de kunlaboro;
- Serĉi pliajn eblajn agadeblojn kaj engaĝiĝeblojn, ekzemple kadre de NRO-platformoj en rilato kun UN (Major Groups/Ĉefaj Grupoj pri Daŭripova Evoluigo);
- Kontakti aliajn neesperantajn organizojn por komunaj projektoj;
- Reprezenti TEJOn kaj UEAn dum eventoj;
- Sekvi EU-politikon kaj UN-politikon kun aparta fokuso al lingvoj, interkulturo kaj junularo;
- Interveni laŭeble en procezoj kun signifa lingvopolitIka flanko aŭ tamen grava por TEJO aŭ UEA (ekz. subvenci-kadroj je eŭropa nivelo) kontaktante specifajn decidfarantojn en taŭga rolo / favorigeblaj al ni;
- Kontribui al informado ene de la Esperanto-movado pri Eksteraj Rilatoj;
- Kontribui al la informado al internaciaj instancoj (UN kaj Unesko) pri la agado de UEA;
- Kontribui al pretigado de pliaj starpunktaj dokumentoj de UEA kaj de TEJO;
- Kontribui al pretigado de gvidlinioj kaj konsilaroj por lokaj agantoj ĉe UN-asocioj kaj Unesko-komisionoj okaze de Internaciaj Tagoj aparte gravaj por la Esperanto-movado kaj temjaroj de UEA ligitaj al Internaciaj Jaroj de UN aŭ Unesko (ekzemple, 2019 estas la Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj, kiu ricevos diversflankan atenton en movadaj eventoj kaj eldonaĵoj);

- Subteni la aleksteran flankon de la organizado de eventoj kiel la Nitobe-simpozioj;
- Kunordigi la administran flankon de la asocio "Esperanto por UN";
- Kolekti kaj ordigi artikolojn kaj esplorojn pri lingvopolitiko aŭ lingvorilataj sciencoj, por fortigi kaj profundigi niajn starpunktojn;
- Antaŭenigi la komunan projekton inter TEJO kaj UEA "KERnaj Urboj":
    - prizorgi kontaktojn kun la lokaj kluboj en la urboj aparte gravaj por nia agado (Novjorko, Ĝenevo, Vieno, Parizo, Strasburgo, Bruselo);
    - plifortigi la kontakton inter reprezentantoj kaj lokaj aktivuloj;
    - engaĝi lokajn aktivulojn en la eksterrilatan agadon (praktike, trejnade, age);
- Sekvi la kampanjon por la elektoj de la Eŭropa Parlamento kaj kunlabore kun EEU kaj la landaj asocioj provi kunordigi kontaktadon de politikistoj pri lingvorilataj temoj.